# LA JUNA PENSO


ORGANO DE LA JUNULFAKO DE SAT

Suppliment au no 9/1149 (Juin 2000) de Sennaciulo

**NOVA SERIO : No 7** **La Juna Penso : APRILO 2000**

**Enhavo de tiu bulteno:**

**p2: Notfoliaro**
**p3: Enkonduko**
**p4: Demokratio**
**p5: Mortpuno**
**p6: Denove pri rilatoj**
**p7: al politikuloj**
**p8: Iom da humuro**



NOTEOLIARO

**SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda)** organizas sian 73an kongreson en Moskvo (Rusio) inter la 15a kaj la 23a de julio 2000. Por havi pliajn informojn, vi povas kontakti nin aŭ skribi al la jena adreso:
**Mikaelo Ĉertilov**
a/k -RU-143000
Moskvo-odinocovo-6
tel/fakso/e-poŝto:
00.7.095.243.74.56
<mikaelo@esperanto.nu>
Se materie eblas al vi, ne hezitu iri tien, por amase kondamni la ĉeĉenan genocidon faritan de la rusa armeo.

**Abonoj:**
Bonvolu sendi la pagon (60 FRF por dek numeroj) al:
SAT-Junulfako
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris
Francio
Poŝtkonto: SAT-Junulfako No 38 319-09J - La Source

**Varbado:**
Normale kun tiu numero vi ĉiuj ricevis unu ekzempleron de la flugfolio pri kiu mi lastfoje parolis. Ni atendas viajn komentojn por venonte prepari pli bonan propagandilon. Tamen, se tiu sufiĉe konvenas al vi, ne hezitu mendi pliajn aŭ propagandi en via medio.

**Paco en Balkanoj**
Bosnia milito ankoraŭ lasas multajn kruelajn spurojn tie. Tamen nun junuloj soifas la kulturon! Kiu volas helpi resemadon de Esperanto?
Temas pri kampara urbeto Gorazdeo, kie estis unu el la plej severaj batalkampoj. Tamen ekde du jaroj "Kolektivo Bretonio-Gorazdeo" (ne E-grupo) organizas Amikan Festivalon solidare en somero tie. Okaze de tio kelkaj aktivaj bretoniaj E-istoj, kiuj estas ankaŭ membroj de la grupo surloke apud la rivero Drina informas pri E-o kaj faras ankaŭ E-staĝon. Tie estas multaj junuloj kaj infanoj, kaj espereble kiel pasintjare ankaŭ kelkaj bosniaj E-istoj vizitos la festivalon. Krome vespere ĉiuj kune ĝuos festivalon.
Kontaktiĝu kun:
- Ĵozet' DUCLOYER
1 allée de Kernisy
FR-29000 Quimper
tel 02098554816
<jpducloy@club-internet.fr>
-Nikol RIZZONI
1 venelle du Casse-cou,
FR-29600 Morlaix



Por regule aperigi la Juna-n Penso-n, ni bezonas vian helpon. Do sendu al ni artikolojn, verkaĵojn, desegnaĵojn, ŝercojn, ideojn, kuirreceptojn, ktp . . .
Ni senpacience atendas viajn kunlaboraĵojn.

**SAT-Junulfako, 67 Av. Gambetta**
**75020 PARIS - FRANCIO**

**Jen la adresoj de la redaktantaro de la Juna Penso**, tio permesos al vi skribi al ni, ne hezitu, ni multplezuros ricevi viajn leterojn . . .

• La redaktoro :

Urĝe serĉas anstataŭanton!

• La kasistino

Vidu la ŝanĝojn sur la paĝo 2.

• La sekretario
Vinko Markov
61, Bd Vauban
78180 Montigny le Bx
France
(Se vi volas ricevi pli rapidajn respondojn, vi povas rekte skribi al tiu-ĉi adreso.)

• La desegnisto
Lino Markov
(sama adreso kiel la sekretario)

• Guillaume Ternant
28, rue Murat
95570 Bouffemont
France
(al kiu vi povas sendi viajn artikolojn. Tio permesos plirapidigi la tajpon de la tekstoj...)

• La peranto de la J.P. en Brazilio, jen denove lia adreso :
Fabricio CARNEIRO NEPOMUCENO
Rua Frei Cipriano 190/202
BR-31250380
BELO HORIZONTE
BRAZILIO

# SAT Junulfako

Ree al ĉiuj!

Jen la sepa numero de LA JUNA PENSO. Se iu el la Junulfaka komitato havis la bonŝancon renkonti vin post la eldonado de la gazeto, vi eble opinios ke ĝi aperas mirinde rapide post la sesa, kompare kun tio kio kutime okazas. Male, se vi ricevis ĝin per la poŝto, vi verŝajne opinios ke ni mokas vin, ĉar estas skribite ke temas pri la aprila numero kaj vi ricevas ĝin plurajn monatojn poste. Fakte, eĉ se ni pli-malpli sukcesis solvi la problemon pri redaktado kaj eldonado de la gazeto, ni tamen spertas malfacilaĵojn por la sendado. Ĝi devas nepre okazi el Parizo, kien ni ne iras ĉiutage.

Post la numero dediĉita al kuirarto, ni revenas al same seriozaj, sed pli kutimaj kaj profundaj debattemoj. Ĉiu en sia vivo spertas multajn problemojn, kaj unu el niaj celoj estas helpi vin ilin solvi, kiam ili rilatas al sociaj problemoj. Do ne hezitu sendi al ni viajn kontribuaĵojn por ke, kune pripenante, ni provu ĉiuj trovi la plej taŭgan kondutmanieron en nia ĉiutaga vivo.

Se vi volas aktivi kun la Junulfako, skribu al la sekretario aŭ al:


*SAT-Junulfako*
*67, avenue Gambetta*
*75020 PARIS*
*FRANCE*

Vi ankaŭ povas retpoŝti mesaĝon al tiuj adresoj:
*satesper@cybercable.fr*
*satesperanto@multimania.com*

# PRI NELEGITIMECO DE ĜISNUNAJ DEMOKRATIAJ REĜIMOJ

Fakto estas, ke politiko spegulas ekonomion. Celo de politika organizmaniero estas subteni kaj pluenigi la ekonomion ĉar politiko estas maniero de administrado, plenumado kaj zorgado celanta garantii la bonfarton de la ekonomio en socio.

Nu, ĉar la nuna ekonomio estas karakterizata de konkurenco kaj maljusteco, ĉar celo de produktado ne estas nur atenti socian neceson, tamen ankaŭ akumuli postreston por ebligi gajnon; ja ĉar tial okazas maljusta disdonado, malmultaj posedante multon kaj multaj preskaŭ nenion, evidentas, ke tiuj, kiuj multon posedas, demagogie aŭ perforte mastrumas kaj trudas formon de politika aparato - Ŝtato - . Resume: la ekonomio kapitalisma estas bazita sur ekspluatado, produktado akumulita en la manoj de malmultaj, riĉaĵo maljuste disdonita, mizero kaj almozpetado; politiko burĝara signifas ŝtato mastrumita de politika klaso reprezentanta la ekonomian mastraron.



Tion konkludante, politika egaleco surbaze de ekonomia malegaleco estas la samo, kiel tegmento sen fundamento.

Demokratio bazigita sur kapitalisma ekonomio estas trompo, reakcia aranĝo por popolamasan menson anestezi; pliklare, ĝi estas nur-nure burĝara diktaturo.

En nuna tempo estas resumita demokratia principo kiel simpla fakto, ke de tempo al tempo eblas al popolamaso baloti - je kandidatoj de supre ĝis sube antaŭelektitaj - kaj poste ĝi restas tute fore de la politika disvolviĝo; ja, ankaŭ popolamaso povas protesti, agiti, fari ion ajn, tamen tio nur estas tolerata supraĵe, ĉar se tio iĝas strukturaĵo tuj senprokraste ĝi estos elruinigita; pliklare, ĉe minimuma ajn ebleco de aliformigo de la nuna stato kapitalisma t. e. meti la produktrimedon sub reĝon de laboristaro, la kapitalismaj mastroj - burĝara ŝtato - ne hezitas alianci kun totalisma aŭ aŭtoritatisma reĝimo. Estu kiel ekzemploj la autoritatismaj diktaturaroj kiuj tutan latinamerikon sangen dronigis dum sesa, sepa kaj oka jardekoj ĉi-jarcente samkiel la totalismaj kiuj samon faris, eĉ pli kruele, en Germanio kaj Italio dum la tria kaj kvara jardekoj.

Ja, demokratio nur eblos efektivigi per socialisma ekonomio, en kiu la produktrimedoj estas zorgataj de tutpopolo, sekve kiam la tuta disdonado de riĉaĵoj okazos laŭ la principo de komuna posedrajto, en kiu ĉiu sociano efektive partoprenos pri decidoj kaj mastrumado de la "res-publiko", laŭ la latina etimologio la "publika afero". Homoj partoprenos en politiko ne nur per balotado sed, kaj tio estas pli grava kialo, per mastrumado de la ŝtato, kiu ĉi-kaze estos favora al popolo.

Ĉi-tiel indas ja elpensi pri ekzisto de la ŝtato mem.

Fabricio

# KIEL BATALI KONTRAŬ LA MORTPUNO EN LAŬDIRE "DEMOKRATAJ" LANDOJ ?

Tuj mi volas precizigi ke mi pritraktos la temon de mortpuno en "demokrataj" landoj, ĉar nur tie oni povas esperi kontraŭbatali ĝin sen postuli samtempe aliajn profundajn ŝanĝojn de la sociordo. Ankaŭ mi pripensas pri kontraŭbatalado de mortpuno sen antaŭdebato pri la taŭgeco de tiu punmaniero, ĉar mi opinias ke ĉiu progresema esperantisto ankaŭ estas humanisto, kaj sekve ne povas akcepti ke oni mortigu sian homan fraton, eĉ se li faris gravajn erarojn en sia vivo. Mi ne elektis tiun debattemon hazarde, sed ĉefe ĉar temas pri iu vere urĝe solvinda problemo, kiu plej rekte koncernas la esperantistaron kaj la SATanaron kun la kazo de kamarado Billy Waldon kiu nuntempe estas en kalifornia mortoalo. Kompreneble, eĉ sen la ekzisto de kamarado Billy, la problemo estus sama.

Jam plurfoje en la historio oni provis malaperigi la mortpunon, aŭ pli modeste nur provi savi homojn kies senkulpeco estis pruvita aŭ pruvebla, sed, laŭ mia nekompleta scio, oni sukcesis nur kiam mortpuno estis jam malkreskanta, kiel ekzemple okazis en Francio, aŭ, kiam temas pri unuopulo, kiam la registaro tiel povis akiri ion profitan. Sed ĝenerale, kaj ĉefe en la kazo de maljustaj mortkondamnoj, la profito de la registaro estas malaperigo de iu danĝera por ilia fireĝimo, aŭ protekto de la vera nekondamnita kulpulo kiam, male, li helpas la fireĝimon. Oni jam plurfoje povis konstati, ke mobilizado de la popolo en la kadro de manifestacioj, sendo de peticiojn, eĉ mondskala, ne sufiĉas. Tion pruvis almenaŭ la usona registaro kun la mondfama kazo de Sacco kaj Vanzetti, en la dudekaj jaroj. Kaj uzo de perforto ĝenerale ne estas konsilinda, ĉefe kontraŭ registaroj kiuj posedas sufiĉe da armiloj kaj sufiĉe da soldatoj, por kontraŭbatali iun ajn grupon.

Do, fine ŝajnas ke se oni postulas forigon de mortpuno de kapitalisma registaro per perforta maniero aŭ ne, oni nenion alian gajnos krom tio, kion ĝi jam planis koncedi al ni, ĉar tio povas esti profitodona. Kaj se mi volas plilarĝigi la debaton, mi povas diri ke estas la samo por la plej multaj aferoj kiuj helpas al homekspluatado. Tio signifas ke oni ne povas efike batali kontraŭ problemoj kiuj servas la kapitalisman sociordon, sen samtempe batali kontraŭ tiu sociordo. Mortpuno ja ekzistis antaŭ kapitalismo, sed ĝi povos rapide malaperi nur se oni anstataŭigos la kapitalismon per alia sistemo, en kiu la homoj vere estos liberaj, egalaj kaj fratecaj.




Vinko

# PLUE PRI RILATOJ AL POLITIKULOJ

En tiu artikolo, Vinko diras, ke ankaŭ la JFa komitato devas iniciati rilatojn kun politikaj partioj kiel "plivastigon de nia agadtereno", kaj ke neglekto de tiaj rilatoj estas "pli liberalisma ol io ajn alia."

Mi samopinias, ke oni ne neglektu sennecese iun ajn agadrimedon, sed oni ankaŭ ne forĵetu tempon kaj penon al ĉiu ajn. Historiaj spertoj montras, ke efektivan kaj firman subtenon Esperanto neniam ricevis el ajna partio influhava. La maksimumo, kiun politikistoj do povas kompreni, estas, ke Esperanto ne estas malbona afero kaj ke Esperantistoj ne estas nuraj revuloj. Sed tamen ili preskaŭ neniam havas tempon mem lerni Esperanton, kaj eĉ malpli por konvinki siajn sampartianojn. Tial oni ne atendu tro grandajn rezultojn el tia kunlaboro. Mi kredas, ke oni povas atingi kelkajn laŭdajn vortojn (kiuj estas tute senutilaj sed ankau ne tro ĝenas) kaj en plej bona kazo kelkajn administrajn, materialajn aŭ eĉ monajn subtenojn. En kunlaboro kun politikaj partioj oni do celkonscie agu rekte al atingo de tiaj subtenoj.

Mia opinie politikistojn (ĉefe ankau lokajn) oni povas plej bone konvinki per konkretaj agadoj. Tiel ekzemple la Maldekstra Forumo en Berlino planis internacian renkontiĝon de maldekstruloj dum la 1999a jara UK. Kaj ĝi ricevis por tio grandan salonon en la domo de la presejo de la gazeto Neues Deutschland, kiu havas proksimajn rilatojn al la germana socialista partio PDS.

Ankaŭ por konkretaj projektoj GEJ (Germana Esperantista Junularo) ricevadas monan subtenon de kelkaj registaraj lokoj (por IS, "kune" ktp).

Sed ĉiu kroma peno, kiun oni investas je establado de rilatoj al politikistoj laŭ mia konvinko estas vane elspezita. Kaj ni ne havas sufiĉe por vane elspezi. Tial ni koncentru niajn agadojn al konkretaj projektoj.

Sebastiano




Ŝajnas ke mi ne estis sufiĉe klara. Mi ne volis diri ke "la JFa komitato devas iniciati rilatojn kun politikaj partioj". Ni kompreneble ne estas sufiĉe multnombraj kaj ne havas tempon por tion fari. Mi nur volis pravigi la partoprenadon de la Junulfako en tiaspecaj aktivadoj, kiam aliaj esperantistaj grupoj organizas ilin kaj

invitas nin. Kaj tio, kion mi opinias liberalisma ne estas "la neglekto de tiaj rilatoj", sed precipe la sindeteno en la balotadoj. Eĉ se la "maldekstruloj" kiuj prezentas sin estas nur maldekstrulaj laŭ la nomo, tamen necesas voĉdoni por ili por ne permesi al la ekstremdekstruloj ke ili atingu la povon. Poste, vi skribas ke "efektivan k firman subtenon Esperanto neniam ricevis el ajna partio influhava". Ĉio dependas de tio, kion vi nomas "partio influhava", sed tamen sciu ke en Jugoslavio, la komunista partio multe helpis la esperantistojn kaj reciproke, kaj la du movadoj kreskis samtempe, ekde la 20aj jaroj, ĉar tie multaj komunistaj gvidantoj ankaŭ estis esperantistoj. Ĝenerale tamen, kaj precize en nuna epoko, via rimarko estas ĝusta, kaj mi ankaŭ konsentas por diri ke oni devas rilati al politikuloj ĉefe kun intencoj pri precizaj agadoj konkretaj. Cetere, efektive favoraj politikuloj bezonas tiajn proponojn.

Vinko

Ŝajnas, ke ni tamen havas praktike sufiĉe similajn opiniojn pri kontaktado al politikaj partioj.

Sebastiano

# GRAVAJ ERAROJ





Ah, malfeliĉa amiko, mi ankaŭ havis kelkajn problemojn kun tiu numero!
Ĉu? Rakontu!
Mi provis la sennaciecan majonezon!
Kaj? Mi ankaŭ provis ĝin, kaj ĝi estis tre bongusta!
Jes, ankaŭ por mi, sed mi estis konstipita dum 2 semajnoj.
Sed, kial?
Mi uzis putraitajn ovojn por fari ĝin!
Dio mia! Kia stultulo...
Hej, Moktaro, ne estas ĉio!
Ah? Vi provis mian recepton?
Ne, mi plendas kontraŭ la desegnisto, Lino!
Kion? Li malbone desegnas la virinojn?
Ne, ne, li estas precipe tro neglektema!
Ekzemple li ne metis la -u de "Malfermu" sur la koverto de la lasta numero!
Krome, la fakoj de la bildstrio estas tro malgrandaj, kaj la kadroj ne estas bone faritaj. Oni eĉ povas meti manon en la aperturo, vidu....
Ah, jes...
Sed oni eble povas pli grandigi la fakojn....
Jes, eble... Arnjj!
Moktaro!!!
Ueps!!?
Feliĉe, li nur falis en la venonta numero!
Ah, Lino, kiel vi povas esti malagrabla! Vi ne akceptas la kritikojn kiujn oni faras! Tiam, vi neniam progresos kaj nur eraros!
Lino
FiMo